



## Enhavo

- AMO transformas sin – rete pluen!
- Retejo de UEA pri la viruso
- Aldonu vin al la apogantaro de UMEA
- Nova Eŭropa Bulteno
- Eventa servo de UEA –nasko - transformo.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-10 sendita el Budapeŝto la 8an de aprilo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 63 nuligita – AMO 63V ekvivas!

Kiel ni anoncis, la 63a AMO-seminario devis esti nuligita. Ĝi devintus okazi en Turkio fine de marto kadre de la 13a Mezorienta Kunveno. Ni imagis la AMO-programon en paŭzo, sed peto de Keyhan Sayadpour venis al la 'patro de AMO':

*"Irana Eo-Kongreso okazos rete, la 16-an kaj 17-an de aprilo. Ĉu vi povas prelegi dume. Ni uzos Zoom programon. Kiel pri eventuala AMO seminario?"*

Sufiĉis tiu sprono. AMO iĝu virtuala (V). Ene de du horoj ni havis proponatan temon kun sub-temaro (alkroĉita kaj sube). Klare, tio devis

### AMO 63V Irano

Loko: Irana reta kongreso

Datoj: 16-17 aprilo (horoj difinendaj)

Komunikilo: Zoom (alirkondiĉoj difinendaj)

Temo: Esperanto kaj izoliĝo

Propono kun subtemoj SMG aprilo 7, 08.44 CEST akceptita ene de 24 horoj de la iranaj esperantistoj kaj la estrarano de UEA pri AMO.

ligiĝi al nia nuna situacio kaj koncizi. La programo donos eblon por kontribuoj de niaj plej engaĝitaj movadanoj, el UEA, ILEI, UMEA, TEJO kaj aliaj. Ni nun laboregas kunigi tiun AMO-teamon. Baldaŭ ni anoncos eblojn partopreni tiun kongreson per virtuala ligo.

UEA donas sian benon al la ideo: la respondeca estrarano, Jeremie Sabiyumva el Burundo skribas:



*"Vi havas mian aprobon, sed indas pristudi fareblecon, pro tio necesas urĝe kontakti la grupeton."*

AMO kontribuu al niaj respondoj al nia izoliĝo.

## Programa temaro por AMO 63 V

1. Perado de fideblaj internaciaj informoj pri la viruso
  - retejo de UEA <[https://revuoesperanto.org/korona\\_viruso](https://revuoesperanto.org/korona_viruso)>
  - rolo de UMEA (niaj medicinistoj)
2. Starigo de retaj kunvenoj
  - kolektejo de ebloj , i.a.ĉe <eventaservo> de UEA
  - manieroj diskonigi rezultojn de tiuj retaj kunvenoj
3. Raportoj pri la situacio en Irano kaj la regiono
  - Irano, Turkio
  - Pliaj landoj de la regiono
4. Alianco kun projektoj
  - Liveri helpon al esperantistaj medicinistoj
  - Formulado de modestaj sed atingeblaj celoj
  - Ĉefaj partneroj: UMEA, IKEF, ILEI.

## Estrarano de UEA pri Faka Agado aktivas

Jen la baza paĝo de UEA pri la viruso: [https://revuoesperanto.org/korona\\_viruso](https://revuoesperanto.org/korona_viruso)

Pri la situacio en Israelo kaj tutmonde mi rakontas en Intervjuo ĉe Ĉina Radio Internacia:

<http://esperanto.cri.cn/2521/2020/03/29/180s209951.htm>

La kunvenoj de la Tel-Aviva E-klubo jam de du semajnoj okazas rete kaj validas por estontaj kunsidoj.

<https://us04web.zoom.us/j/589917731>

Ankoraŭ precize kaj laŭlande pri korona viruso tutmonde:

<https://www.arcgis.com/apps/opsdashboard/index.html#/bda7594740fd40299423467b48e9ecf6>

Apelacio de la Ĝenerala Sekretario de UN,

<http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/aliaj-un-dokumentoj/urga-mesago-de-la-generalasekretario-de-unuigintaj-nacioj/>

## Apogu niajn medicinistojn!

Rezulte al la alvokoj de EKO 9, la prezidinto kaj prezidanto de ILEI anoncis sin. Krome unu ĉefe loka aganto faris tion: Mirejo Grosjean (CH), Stefan MacGill (HU) kaj Malgosia Komarnicka (PL). Tiu triopo alvokas al vi, aldonu vin – donu forton kaj apogon al niaj sanservantoj! Nia celo: milo da apogantoj! Skribu nur al <umea<ĉe>uea.org.

## Nova eŭropa bulteno

Vi povas legi ĉi tie <https://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

Mi petas tiujn, kiuj povas, plu dissendi tiun informon al pliaj listoj.

## La nova Eventa Servo de UEA adaptas sin

Ni planis recenzi tiun brilan novan servon de UEA, sed la maleblo de fizikaj kunsidoj subite bremsis tiujn planojn. Ĝi grupigis la eventojn: internaciajn, lokajn kaj retajn. La tria kategorio estis tiam la plej eta, sed subite ĝi iĝas la plej grava. La organiza teamo laboregas kreskigi tiun parton. Multaj lokaj kluboj jam organizis retajn kunsidojn, eĉ la AMO-programo de UEA tion nun faras. Grandaj someraj kongresoj okazos rete. Niaj komunikoj portos al vi pliajn evoluojn pri la ebloj starigi kaj teni kontaktojn rete. Tajpu nur <eventaservo> en vian serĉilon, kaj aperos la paĝaro. Svarmas retaj ebloj!

hodiaŭ							1 – 30 aprilo 2020							Monato		Listo		< >		
Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim	Lun	Mar	Mer	Ĵaŭ	Ven	Sab	Dim
	30	31	1	2	3	4	5													
[GB - Wellesbourne] 1	9:30 [BE - Charleroi]	[ES - Cullera, Valencia] Esperanto-Plaĝo en Hispanio, Jaro 2																		
[TR - Çeşme] 13a Me	17:00 [PL - Sopot] Si	[DE - Halbe] Laborbrigado en la Esperanto-Stacio																		
9:00 [Enrete] Klubo ĉ	18:00 [FR - Mulhous	18:00 [AU - Adelaidi]	[IL - Tel Aviv] 21-a Israela kongreso																	
10:00 [MG - Antanar	18:30 [GB - London	18:30 [NZ - Taurang	[HU - Budapeŝto] Ku	[ES - Bilbao] Esperan	[Enrete] La 40a Namgang lernejo															
+6	+2	+2	+11	+6	+6	+5														
6	7	8	9	10	11	12														
[ES - Cullera, Valencia] Esperanto-Plaĝo en Hispanio, Jaro 2																				
[DE - Wittenberg] 36-a Printempa Esperanto Semajno (PSI)																				
9:00 [Enrete] Interna	17:30 [Enrete] Kurso	[IT - Torino] IJF 2020																		
16:00 [AT - Vieno] N	18:00 [SI - Ljubljano]	16:00 [EE - Talino] T	13:30 [FR - Thionvill]	18:00 [CA - Montréal]	[FR - Baugé-en-Anjou] 72a Kongreso de SA															
+5	+4	+5	+6	+3	+4	+5														
13	14	15	16	17	18	19														
[ES - Cullera, Valencia] Esperanto-Plaĝo en Hispanio, Jaro 2																				
[DE - Wittenberg] 36-	16:30 [DE - Herzber	[DE - Hamburg] Instru-semajnfino Arto-soko	[ES - Barcelona] La unua ĉiujara poliglota kr																	
[IT - Torino] IJF 2020		18:00 [CZ - Brno] Se	[IR - Teherano] 7-a Irana Esperanto Kongreso, IREK-7	[BE - Kortrijk] Tago d																
[FR - Baugé-en-Anjou	18:30 [Enrete] Kurso	19:00 [Enrete] Ludo	17:30 [US - Oakland]	[FR - Baugé-en-Anjou] 10a PRINTEMPaS																
+3	+2	20:00 [NL - Eindhoven]	+8	+5	+9	+6														

Vortoj: 540

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde

Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, uĵistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.